

le monde de l'ESPÉRANTO

numéro
578
24 juin 2011



DOSSIER

Espéranto, langue de la solidarité

PAGE 6

BILINGUE

Lettres du Japon par HORI Jasuo...

PAGE 10

espéranto
France

3,80 €

- L'actualité de l'espéranto
- La vie de l'association
- Culture et voyages

éditorial • frontartikolo

En tant que président, l'une de mes premières missions sera de trouver quelqu'un pour me remplacer. Non pas que je souhaite terminer mon mandat au plus vite, mais bien au contraire, d'envisager l'avenir et de faire en sorte que la future génération puisse parcourir les différentes étapes, à commencer par la découverte de l'espéranto, son apprentissage, son utilisation au travers des congrès et des échanges avec les espérantistes du monde entier, en espérant que par l'engagement associatif elle jouera un rôle important dans les différents projets de l'association.



Aujourd'hui, la première étape, la découverte de l'espéranto, peut être accomplie grâce à la pétition pour l'espéranto au bac. Cette pétition a bien évidemment pour but premier la reconnaissance de l'espéranto, mais c'est aussi et avant tout l'occasion d'aborder la question de l'espéranto auprès des jeunes, de leurs parents, des enseignants et de toutes les personnes qui se sentent concernées par l'éducation des générations futures. Cette pétition est également l'occasion pour chaque espérantiste de s'engager dans un combat qui unit les deux principales associations française que sont Sat-Amikaro et Espéranto-France, mais également toutes les associations locales qui prennent part à ce grand projet.

Axel Rousseau, président d'Espéranto-France

Kiel prezidanto, mia ĉefa tasko estos trovi iun por anstataŭi min. Mi ne intencas laŭeble tuje fini mian mandaton, tute male, mi intencas prepari la estontecon kaj helpi la venontan generacion trapasi la diversajn ŝtupojn : komence malkovri esperanton, lerni ĝin, uzi ĝin kadre de kongresoj kaj interŝanĝi kun esperantistoj de la tuta mondo kaj sekve klopodi por ke ili aktiviĝu en nia asocia movado kaj partoprenu en la diversaj projektoj de nia asocio.

Hodiaŭ la unua ŝtupo, malkovrado de esperanto, realigeblas per la petskribo por Esperanto en la abiturienta ekzameno. Tiu petskribo memkompreneble celas akiri rekonon de nia lingvo, sed ankaŭ estas okazo por paroli pri Esperanto al junuloj, iliaj gepatroj, instruistoj kaj ĉiuj kiuj koncerniĝas pri edukado de venontaj generacioj. Tiu petskribo ankaŭ estas grava okazo por ĉiuj esperantistoj aktiviĝi en tiu agado kiu ligas la du ĉefajn francajn asociojn – Sat-Amikaro kaj Espéranto-France – sed ankaŭ ĉiujn lokajn asociojn kiuj partoprenas en tiu grava projekto.

Axel Rousseau, prezidanto de Espéranto-France

ACTUALITES

► Nouvelles du Japon grâce à l'espéranto p.4

DOSSIER

► Espéranto langue de la solidarité p.6

ASOCIA VIVO

► IREM en Sète... p.11

BILINGUE

► Leteroj el Japanio p.10

VOYAGES

► Rose kaj Cyrille en Meksikio p.19

Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris

Tél. 09 51 77 18 33 - www.esperanto-france.org

Tout (sauf réd.) : info@esperanto-france.org

Trimestriel : 4 n° par an - Dépôt légal à parution

Tous droits de reproduction réservés

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.

Directeur de publication : A. Rousseau

Rédacteur en chef : Claude Nourmont

mondo@esperanto-france.org

Envoi des articles 1 mois avant parution

Ont aussi participé ou contribué à ce numéro : M. Abada-Simon, F. Bartsch, J.M. Cash, P. Chavignon, J. Chirimwami Sironge, R. Coquisart, S. Colic, B. Flochon, HORI J., A. Jacquard, A. Kadar, S. Keith, K. Kovats, A. Lagrange, B. Lagrange, J. Le Puil, B. Moon, A. Plutniak, J. Ripoché, A. Rousseau, R. Triolle, Retpagxoj de Cyrille kaj Rose, edukado.net, IREM, Kvinpetalo, Ret-Info, UEA. Merci à eux !

Publicité/annonces : à la rédaction

Abonnement : 1 an (4 n°) : 18€ à

Espéranto-France

Impression : IPPAC, Langres (52),

membre de Imprim'vert

Imprimé en juin 2011

Mise en page : Bruno Flochon

ISSN 1628-1942 - Commission paritaire : en cours

Ce dessin est reconnaissable par certaines téléphones mobiles et permet de se connecter au site internet indiqué par le code.

Le code ci-dessous indique le site d'Espéranto-France.



Nouvelles du Japon grâce à l'espéranto

Depuis le 12 mars, au lendemain du drame qui a frappé le Japon, HORI Jasuo tient une chronique des événements et l'envoie quotidiennement par Internet. Ces chroniques en espéranto sont ensuite diffusées sur plusieurs listes, entre autres en France sur la liste ufe-



anoncoj, Espéranto-Angers et Espéranto-Provence. Vous les trouverez en espéranto sur le site de SAT (<http://www.satesperanto.org/-Taglibro-denia-Kamarado-Yasuo-.html>) et aussi avec une traduction en français sur le site d'Espéranto-Provence et Angers. Depuis la mi-avril, HORI envoie ses messages seulement deux ou trois fois par semaine.



Ces chroniques donnent des informations tirées des journaux locaux, mais surtout reflètent les événements sous

un angle personnel. Lors du premier séisme, HORI est à la Poste. Il se cache sous une table. Il va ensuite voir sa mère qui habite à proximité : rien de grave, elle va bien. Puis il rentre chez lui. Sa femme va bien, mais Zamenhof et quelques poupées ont souffert, en tombant des étagères...

Jour après jour, il retrace les événements tels que les vivent les Japonais : ceux de la région dévastée, ceux des autres régions, les réfugiés... Les personnes âgées sont particulièrement touchées. Au séisme et au tsunami s'ajoute la catastrophe nucléaire. HORI complète sa chronique par des statistiques sur le nombre de disparus. Mais, surtout, les impressions et le vécu de différentes personnes, par exemple celui des adolescents et des vieillards dans un refuge, qui arrivent à survivre et gardent quand même espoir.

Nous comprenons mieux ce que vivent et ressentent les Japonais. En lisant ces messages, nous nous sentons très proches de nos amis du Pays du Soleil Levant. Vous trouverez un exemple de ces chroniques sur la page bilingue de ce numéro.

(d'après *Espéranto Aktiv'*,
Lettre numéro 13 - avril 2011)

Pour sauver une vie

Aleksander Korjenkov, né dans l'Oural, ingénieur dans l'industrie pétrolière et Halina Goretska, née au Kazakhstan, ingénieure en informatique, se sont connus en 1981 grâce à l'espéranto en Ouzbékistan. Depuis lors, ils ont accompli ensemble un travail remarquable : édition (*Sezonoj*), revue «La Ondo de Esperanto», podcasts «Radio Esperanto», traductions etc. Ils ont longtemps vécu à Sverdlovsk (ville redevenue Ekaterinbourg à partir de 1991). En 2001, ils sont venus s'installer à Kaliningrad, au bord de la Baltique. Ils ont vécu de l'espéranto

qu'ils ont géré à la façon d'une petite entreprise, avec beaucoup de compétence et de sérieux, dans la passion du travail bien fait.

Cet appel vise à collecter de l'aide pour une grave opération (greffe de rein) que doit subir Halina suite à un problème de santé consécutif à la catastrophe biologique de Sverdlovsk en 1979 où il y avait l'un des laboratoires d'armes biologiques les plus importants d'URSS. Malheureusement, l'opération ne peut se faire que dans un hôpital de Moscou. Le temps d'attente est très long. Afin d'être prêts à l'heure venue, ils doivent louer

en bref • mallonge

● DES CHIFFRES...

2 000 inscrits sur le site pédagogique edukado.net, 100 000 usagers de la méthode d'apprentissage de l'espéranto en ligne *lernu!*, plus de 150 000 articles en espéranto sur *Vikipedio*...

● ET DES LETTRES

Olivia Cattan (journaliste, présidente de l'association Paroles de femmes) vient de publier un nouveau roman intitulé "Kabbalah esperanto".



« J'écrivais un roman d'amour qui mettait en scène une femme de 41 ans et un jeune homme de 26 ans. Et, un matin, comme si cela s'imposait, toutes ces histoires se mélangèrent et s'enchevêtrèrent. Les kabbalistes prenaient corps sous ma plume pour devenir de véritables personnages de roman et l'espéranto devenait ce lien imperceptible qui permettrait de relier les mondes. »



un petit appartement dans l'une des villes où les loyers sont les plus chers au monde. Les économies du couple ne peuvent suffire à couvrir tous les frais.

Pour les aider, votre contribution est bienvenue. UFE se charge de collecter vos dons et de les transmettre. Mentionner "pour Halina".

Pétition pour l'espéranto au bac

Un mois et demi après le lancement de la campagne de pétition pour l'espéranto au bac, voici un point d'étape.

Lors de la Rencontre Inter-associative d'espéranto sur la Méditerranée (IREM 2011) à Sète (22-26 avril), l'ensemble du matériel a été diffusé aux associations. Feuilles de pétition, tracts format A5, journaux de campagne format A4, affiches. Il faut donc prévoir pour bientôt un retraitage.

Pour permettre le retraitage des A4 et A5, les dons sont les bienvenus. Les adresser à Espéranto-France, qui centralise les dons pour la campagne, en précisant comme commentaire «Pétition» (ou «Petskribo» ou «Peticio»).

Voir <http://esperanto-france.org/comment-payer>

Une lettre a été transmise fin mai à tous les députés pour la deuxième fois, après celle de janvier, pour les informer cette fois du démarrage de la campagne, remercier ceux qui ont signé, inciter ceux qui ne l'ont pas encore fait à le faire.

Parmi les premiers signataires, des personnalités telles que Gérard Aschieri, Guy Béart, Mgr. Gayot, Georges Moustaki, Michel Onfray, Catherine Trautmann, Henriette Walter...

La seconde liste de signataires s'est considérablement étoffée depuis la mise en ligne de la pétition. Elle compte maintenant plus de 85 noms. Citons ainsi deux porte-parole nationaux du NPA, Raoul Marc Jennar, Charb, Cabu, des maires, conseillers généraux...

Voir cette liste ici : http://esperanto-au-bac.fr/spip.php?page=signataires#seconde_liste

Signatures d'élus, de personnalités

Il est toujours temps de faire signer des personnalités. Utilisez la feuille de

signature spéciale, mise à disposition sur le site : <http://esperanto-au-bac.fr/IMG/pdf/feuillesignatureelus.pdf>

Nombre de signataires

3875 au total au 3 juin 2011, dont 1521 collectées en ligne. A noter, 900 signatures avaient été récoltées lors de la Fête de l'Huma en septembre 2010. De nombreux messages d'encouragement sont parvenus par courriel (plus de 60 messages reçus).

Couverture médiatique et internet

La campagne a été mentionnée dans plusieurs médias espéranto ou non et annoncée sur une quinzaine de sites internet. Cela peut sembler beaucoup, mais c'est très insuffisant. Il faudrait que chaque site d'association d'espéranto, mais aussi les blogs, les forums etc. renvoient vers le site de la pétition.

L'argumentaire va être traduit en espéranto pour être mis à disposition des espérantistes non-français.

Quelques conseils pour la suite

- N'hésitez pas à monter des stands cet été et à demander à avoir des stands dans les différents festivals.
- Rendez compte, si possible avec des photos, de vos actions (stands, affichage etc) pour la rubrique actualité du site et les revues.
- Pensez à renvoyer vos signatures au fur et à mesure pour que le compteur augmente régulièrement... et pour ne pas au final oublier de les renvoyer.
- Faites signer - au moins - 20 proches, on aura ainsi plus de 40 000 signataires !
- Sans oublier de renvoyer les signatures, si collectées sur papier, pour prise en compte sur le site.
- Faites se propager la pétition sur inter-

net (envoi de courriels, liens depuis des sites, messages sur des forums etc).

- Faites signer des personnalités, notamment des élus.

La Commission Pétition



Roland Ries, Maire de Strasbourg, signe la pétition sur le stand d'Espéranto-Strasbourg lors de la Journée Portes ouvertes du Parlement européen le 8 mai 2011.

Je reçois comme un honneur la proposition de parrainer cette pétition en faveur de l'espéranto. Je souhaite que l'enseignement de l'espéranto soit officialisé par les autorités de nombreux pays. Un jour viendra où tout être humain saura utiliser l'espéranto comme un instrument de mise en commun.

Albert Jacquard

Oni ne devas izoligi Esperanton de la ekstera mondo, kiel mesaĝis juna Hector Hodler, fondinto de UEA. Esperanto estas lingvo de solidareco. Temas pri helpo al rekonstruo de detruita lando, temas pri helpo al individuoj por konstrui pli bonan vivon, temas pri informado pri la klopodoj de damaĝita popolo reveni al normala vivo aŭ simple temas pri solidara turismo.



ESPÉRANTO, LANGUE DE LA SOLIDARITÉ

Vojo de rifuĝinto el Kongolando

Mi naskiĝis en Bukavu, urbego situanta oriente en Demokratia Respubliko de Kongolando, antaŭ 45 jaroj. Mi hazarde lernis esperanton en 1998, ne sciante ke iam, esperanto utilos al mi (1). Kiel rememorigo, en 1994 okazis genocido en Rŭando. Post tio, la rŭandaj soldatoj forpelitaj el sia lando, fuĝis al mia naskiĝ-provinco kiu troviĝas ĉe la landlimo. Ili daŭre kaŝas sin en la arbaro kaj kutimas elrabi niajn vilaĝojn. Jam en 2007, rŭandaj ribeluloj priŝtelis mian domon kaj kunportis mian filinon (tiam 21 jaraĝa) kaj alian knabinon en la arbaron por ilin perforti. Poste, ili vun-

dis ilin per tranĉilo kaj el ambaŭ, nur mia filino supervivis. En 2009, denove dum mia foresto, mia edzino havis tian ege malagrablan viziton (ŝtelado, morto-minacoj, peto de ostaĝ-mono...).

Pro tiu malsekureco en mia provinco, mia fratino, kiu jam loĝis en Kinŝaso (ĉefurbo de RDKongolando), je 2 000 km okcidente de ni, proponis ke ni translokiĝu al ŝia urbo. Akceptinte, mi ekflugis al Kinŝaso la 31^{an} de julio 2009, sola, por serĉi loĝejon por la tuta familio. Kun la edzino, mi estis preparinta vojaĝ-sakojn kun donaco por mia fratino : fumaĵitaj fiŝoj, specialaĵo de nia regiono netrovebla okcidente.

Je mia alveno en la Kinŝasa flughaveno, la kontrolistoj esploris miajn pakaĵojn kaj ektrovis ne nur la fiŝaĵon sed ankaŭ malnovajn politikajn propagandilojn forgesitajn en malgranda poŝo. Oni tuj arestis kaj enkarcerigis min, eĉ ne permesante averti la familion kaj konfiskis mian tutan bagaĝon, inkluzive la identigilon.

Dum preskaŭ kvin monatoj, mi restis en prizono, sen proceso, ĝis mia bofrato sukcesis ŝtele liberigi min per korupto-

mono. Tio okazis la 24^{an} de decembro 2009. Por ne kompromiti la personojn kiuj partoprenis en mia liberigo, mi devis fuĝi eksterlanden.

Unue, mi intencis iri en najbaran landon kiel Angolo aŭ Brazavila Kongo, sed sen identigilo, kiel transiri la landlimon ? La ideo uzi ŝipon por fuĝi el mia lando venis de mia nevo. Per trajno, li akompanis min al Matadi, ĉefa haveno de Kongolando. Tiam, necesis informiĝi pri kie aĉeti specialajn nutraĵojn, kiel eniri ŝipon kaj entute, kiel iĝi vera kaŝ-vojaĝanto.

La 17^{an} de januaro 2010, post tri tagoj da laboro sur la haveno, mi sukcesis enŝteliĝi en la grandan komerc-ŝipon kie jam troviĝis miaj « milit-biskvitoj » kaj « milit-akvo ». Mi tute ne sciis pri ĝia celloko. Malsupre, en la holdo, mi malkovris ok aŭ naŭ homojn kun verŝajne, similaj intencoj kiel la miaj.

Komenciĝis la silenta kaj senluma vojaĝo

Komenciĝis la silenta kaj senluma vojaĝo kun, kiel unua defio, la neceso protekti sin kontraŭ la tusiga gaso kiun la maristoj sisteme vaporigas en la holdon antaŭ la ekiro. Metodo : malsekigi tukon kaj kovri per ĝi nazon kaj

En préparation, les prochains dossiers

LME 580 : L'espéranto, langue facile ?

LME 581 : A quoi jouer en espéranto ?

Envoyez vos contributions à
mondo@esperanto-france.org

buŝon. Poste, kovri la tutan kapon per koton-sako. Konservu tiun improvizitan maskon dum almenaŭ tri horoj...

La 12^{an} de februaro, mi sentis ke ni haltis en haveno kaj decidis eliri. Estis la 3^a matene. Mi rapide malproksimiĝis de la haveno supergrimpinte la ĉirkaŭ-kradon. La vetero estis ege malvarma. Mi trovis koridoron kie mi sidis ĝismatene. Pasis homoj kiuj parolis france. Mi estis do en Francio kaj mia unua ideo estis serĉi en Parizo la oficejon de HCR (Haut Commissariat (des Nations Unies) pour les Réfugiés). Per buso, mi atingis Parizon. Mi demandis Afrikanon pri la adreso de HCR. Li ne povis informi min sed, mi ne scias kial, li donis al mi 2 eŭrojn por veturi ĝis Saint-Denis, pensante ke, tie, iu povos informi min. Dum la longaj horoj en la malvarmo (estis neĝo) kiam mi obstine demandis la homojn pri la adreso de la HCR-oficejo, pluraj personoj helpis al mi diversmaniere (donaco de koltuko, invito al Mac Donald, donaco de simkarto por mia telefono...). Eknoktis. Mia demando transformiĝis al « ...Ĉu vi havas lokon por dormi ? ».

Mi ekpensis pri Esperanto : eble esperantistoj povus helpi min

Estis vendredo. Finfine, iu afrikano akceptis min en sia hejmo ĝis lundo (kiam mi povus trovi tiun oficejon). Ni uzis diversajn transport-rimedojn kaj faris longan vojon. Post rapida manĝo, mi dormis ĝis la reveno de mia gastiganto, sabaton posttagmeze. La



Josefo, dum IREM en Sète, klarigas sian vojaĝon.

dimanĉon, li avertis min ke lundo frumatene, li akompanos min ĝis Parizo (por mia serĉado) kaj mi devos trovi alian loĝlokon. Tiam, mi ekpensis pri Esperanto. Eble esperantistoj povus helpi min. Mi tuj petis de mia gastiganto la permeson uzi lian komputilon kaj tajpis « Espéranto en France » kaj Google respondis per longa listo de asocioj. Senhezite, mi elektis la francan asocion de katolikaj esperantistoj kaj malkovris telefon-numeron de sinjorino Michèle Abada. Tuj, mi alvokis ŝin kaj rakontadis pri mia situacio. Ŝi fine demandis min « Kaj nun, kie vi troviĝas ? ». Mi tute ne sciis kaj devis informiĝi ĉe la gastiganto. « En Bondy », li respondis.

Michèle diris « vi estas bonŝanca ĉar en Bondy loĝas esperantistino kiu certe povos helpi vin ». Ŝi donis al mi la telefon-numeron de Sinjorino Elisabeth Barbay.

Vi verŝajne divenas la sekvon. Mi telefonis al Elisabet, kiu post denova rakontado venis vespere, eĉ kun vintraj vestoj por

mi, al la adreso kie mi momente gastis kaj ni kune piediris ĝis ŝia domo. De tiam, mi loĝas tie kaj, dank'al ŝi, mi ne plu iris al HCR- oficejo sed unue ni kontaktis la oficejon « France Terre d'Asile ». Poste, mi malkovris la prefektejon kiel respondecan lokon pri azil-peto. Dum la longa proceduro kiu daŭris unu jaron, ŝi helpis min diversmaniere (loĝado, transportpago, manĝaĵo ktp...). Pere de ŝi, mi konatiĝis kun aliaj esperantistoj. Mi do ege gratulas ŝin pro ŝia boneco.

Laŭ mia sperto, per Esperanto, la mondo estas senlima. Pro tio mi konsilas al homoj tutmonde kiuj ĝis nun hezitas lerni tiun lingvon, ke ili lernu ĝin kaj venu malkovri, same kiel mi, tiun senliman mondon.

Joseph Chirimwami Sironge

(1) Mi lernis Esperanton en 1998 hazarde irante iun sabaton matene ĉe vendisto kiu donis al mi informojn pri baha kredo. La informilo estis dulingva, franca kaj esperanta. Mi trovis la adreson de UEA, kie mi informiĝis por lerni la « alian lingvon » de tiu informilo.



La haveno de Matadi

“Espero” sur la hodlera vojo

Japanio, Libio aŭ Bolivio estas nur lastaj viktimoj de la sama fenomeno, naturaj kaj sociaj katastrofoj, kiuj ĉiutage minacas homojn tra la mondo. Ili trafas ĉiun homon egale, senkonsidere ĝian rasan etnan aŭ religian apartenon kaj socian

pozicion. Ili trafas nordajn kaj sudajn mondopartojn, altevoluatajn kaj subevoluintajn landojn.

Solidareco – la homa bezono

En ambaŭ kazoj, ĉu de naturaj katastrofoj (tertretoj, inundegoj, ventegoj, erupcioj de vulkanoj, cunamoj, pluvegoj kun erozioj kaj terglitado...), ĉu de sociaj katastrofoj (militoj, malsatego, epidemioj, rifuĝintaj krizoj, politikaj malstabilecoj manifestataj en t.n. revolucioj kaj kontraŭrevolucioj...), viktimo estas ordinara homo kiu subite sin trovas en treege malfacila situacio, kutime sen domo, nutraĵo, vestaĵo, materialaj havaĵoj, minacata de epidemioj, rifuĝo, prizono aŭ koncentrejo.

Sed la homo ne estas nur biologia estaĵo. Dank al ties psiĥo, sento kaj emocioj, en malfacilegaj situacioj

por iuj homoj, instinkte aktiviĝas ĉe aliaj homoj dividemo de la tragedio kun la suferantoj, helpemo kaj solidaremo kun ili.

Solidareco estas baza karakterizo de la homa komunumo. El ĉiuj vivestaĵoj la homa specio plej longe dependas de la helpo de kunspecianoj (gepatroj, familio, artistoj) por povi transvivi. Tial helpemo kaj solidareco estas instruitaj al la homo ekde infanaĝo en familio, en lernejo, de religio, ktp.

Ĉar la fenomeno ne estas nova, la moderna internacia komunumo establis efikajn instrumentojn por povi tuj reagi kaj ekagi en krizaj situacioj. Sur tutmonda plano ni aludas al specialiĝitaj organizoj kaj agentejoj de UNO (ekz. UNICEF aŭ UNHCR – Alta komisaro por rifuĝintoj) aŭ en Eŭropo al ECHO – Humanitara Oficejo de EU. Krome, preskaŭ ĉiuj landoj establis ŝtatajn organismojn kaj fondusojn kiuj disponas propran organizan strukturon kaj konsiderindajn monfontojn por soli-



Volontuloj de Espero disdonas nutraĵ-pakaĵojn

SOLIDARA TURISMO EN ESPERANTIO

Post kunlaboro plurjara kun la projekto “Indiĝenaj Dialogoj” (ID) kaj post ties preskaŭa kolapso – ĉefe pro senfinanciĝo - kelkaj membroj mezamerikaj de la indiĝena konsilantaro de ID kaj mi decidis daŭrigi la projekton kaj elektis solidaran ekoturismon ĉe indiĝenoj kiel la plej facile organizeblan agadon finance memstaran por instigi la indiĝenojn al lernado kaj uzado de Esperanto.

Ekde 2006, 4 vojaĝoj estis organizitaj en Gvatemalo kaj Kostariko. Kadre de antaŭkongresa ekskurso de la Universala Kongreso en Kubo en 2010, partoprenis vojaĝon dektagan en Gvatemalo 8 italoj kaj 4 japanoj .

Du pliaj, trisemajnaj, estas antaŭviditaj en januaro 2012 en Gvatemalo kaj en februaro 2012 en Nikarakvo-Kostariko.

Ĉiuj vojaĝoj okazas laŭ solidaraj kriterioj kaj respondeca turismo.

Procentaĵo de la buĝeto de ĉiu vojaĝo estas apartigita por financi solidaran agadon surlokan.

Jam estis financataj la kreado de legomĝardeno por infanoj en indiĝena vilaĝo Terraba en Kostariko kaj la studado de pluraj gejunuloj indiĝenaj.

En Gvatemalo, mi decidis stipendii junulinojn indiĝenajn kiuj

ne povus daŭrigi siajn studadojn sen monhelpo. Jam pluraj esperantistoj patronis ĉi-kadre.

Partopreno al vojaĝoj kontribuos al la sukceso de tiu agado. Se vi ne emas aŭ ne povas vojaĝi, vi povas stipendii junajn indiĝeninojn.

Povas esti ankaŭ bona okazo por lerni la hispanan dum la vojaĝo aŭ antaŭ aŭ post.

Tio povus eĉ allogi neesperantistojn por partopreni lernante E-on aŭ la hispanan samtempe kiel kunvivo kun indiĝenoj. Do, dankon por via kontribuo, vojaĝante, diskonigante la agadon, subtenante la lernadon de gejunuloj indiĝenaj...

Bv kontakti min, Philippe CHAVIGNON, werphatao@hotmail.com



dara helpo. Apud tio establiĝis kaj efike funkcias aliaj interŝtataj kaj internaciaj neregistaraj humanitaraj organizoj kaj agentejoj ekde ekz-e Ruĝa Kruco ĝis Kuracistoj Sen Limoj. Amasego da ili estas organizitaj sur nivelo de ŝtatoj kaj komunumoj, formitaj el privata iniciato, fonditaj de eklezioj, kooperativoj, fakaj kaj sindikataj organizoj aŭ establitaj de mecenatoj kaj filantropoj.

Pere de siaj programoj kaj projektoj pri (tuja) solidara helpo tiu ĉi sistemo de, plej parte, tute volontulaj organizoj transformas en vivon internacian solidarecon de milionoj da ordinaraj homoj je mildigado de malfeliĉego kiu trafas ĉiutage homojn tra la mondo.

La apuda skemo ilustras principan funkciadon de organizita solidara helpo ekde sistemo de interŝtataj, ŝtataj aŭ privataj fondusoj tra sistemoj de humanitaraj organizoj ĝis viktimoj mem. Ĝi ĉiutage cirkuligas centmilionojn da eŭroj.

Defio de la milito en Bosnio

Simile kiel fondiĝis pluraj aliaj neregistaraj neprofitcelaj bonfaraj organizoj, fondiĝis ankaŭ humanitara Organizo "Espero" Sarajevo, unue kiel humanitara sekcio de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. La iniciaton kaj fondiĝon trudis senskrupula agreso kontraŭ Bosnio kaj precipe sieĝo de Sarajevo (1992-1995).

La celo estis peradi kaj disdonadi helpon al ĉiuj anoj de la asocio, sed ankaŭ al aliaj civitanoj, precipe nutraĵon, medikamentojn aŭ monon senditajn el eksterlando de diversaj humanitaraj organizoj aŭ de la E-movado.

Post la milito en 1996, "Espero" transprenis iniciatojn pri renovigo de la detruita lando, evoluigante siajn edukajn, kulturajn kaj teknikajn programojn. Por povi ĉerpi eksterlandajn fondusojn, almenaŭ el eŭropaj landoj, kunlabore kun Kataluna E-Asocio estis fondita "Espero Sabadell". Dank al tio "Espero" povis aliĝi al iniciato pri rekonstruado



Infanoj en la rekonstruita lernejo en vilaĝo Stanić Rijeka (Doboj)

de detruita hospitalo en bosnia urbo Teŝanj el hispaniaj solidaraj fondusoj. Dekoj da kataluniaj urboj decidis parton el siaj 0,7% de komunuma buĝeto destinita por solidaraj projektoj, sub kunordigo de Kataluna Fonduso por Kunlaboro kaj Disvolvo (Fons Catala) direkti al rekonstruado de la hospitalo. Kolektiĝis komence la inicaj 200.000 € kaj post iom da lobiado la tutan projekton gajnis surloke realigi HO "Espero". Al la projekto baldaŭ aliĝis ECHO, ĉeĥa adventista organizo ADRA, germanaj Maltaj Kavaliroj, tiel ke danke al kunlaboro de kelkaj humanitaraj fondusoj kaj organizoj, la urbo Teŝanj ricevis novan hospitalon kun suma investo de 2 milionoj da eŭroj.

En la periodo de 1996-2008 "Espero"-Sarajevo plejparte kunlabore kun "Espero-Sabadell" realigis en Bosnio dekon da teknikaj projektoj, interalie konstruadon de akvoduktaj sistemoj en komunumoj Doboj-Oriento kaj Doboj-Suho Polje, rekonstruadon de ambulatorioj kaj lernejoj, ekipiĝo de pluraj ambulatorioj kun modernaj medicinaj aparatoj, helpo al rifuĝintoj de Kosovo ktp. en suma valoro de pli ol 1.500.000 €.

Gravas emfazi ke HO «Esperon» fondis E-organizoj kaj ke ĝi uzis Esperanton kaj eblecojn de la E-reto por sia funkciado. Sed kompreneble en tiu specifa socia agadsfero ĝi kunlaboris kun diversaj aliaj (inter)ŝtataj instancoj kaj organizoj uzante plurajn aliajn lingvojn

kaj helpojn de centoj da volontuloj aŭ (pagitaj) fakuloj depende de konkreta projekto. Ĝia ĉefa tasko estis servi al la celo – helpi homojn en situacio de ilia bezono por la helpo.

Sekvi la modelon de Hodler

La lingvo Esperanto en la konkretaj kazoj plenumis sian mision. « Oni ne devas izoligi ĝin de la ekstera mondo », siatempe mesaĝis juna Hector Hodler, la fondinto de UEA. Kiel sciante, krom la fondiĝo de UEA kaj redaktado de la revuo, Hodler kaj la Centra Oficejo de UEA en la mondoskua 1914 lanĉis dum la kvar militaj jaroj solidarecan kampanjon utiligante ĉefe la reton de delegitoj kaj membroj de UEA por interŝanĝigi leterojn, liveri nutraĵojn, medikamentojn, vestaĵojn, serĉi perdiĝintojn, rehejmigi infanojn, prizorgi militkaptitojn. La CO de UEA faris 100.000 servojn jare ne por esperantistoj, sed por homoj ĝenerale ! UEA funkciis kiel potenca internacia humanitara organizo, samnivela al la Ruĝa Kruco, Esperanto pruviĝis kiel efika instrumento de "praktika internaciismo". Neniam poste UEA aŭ la E-movado ĝenerale, malgraŭ dumjardekaj kaj ĉiutagaj katastrofoj tra la mondo, ripetis tian sperton. Ĉu la lastaj spertoj de "Espero" (Sarajevo-Sabadell) denove restos fajrero en historio de la E-movado ?

Senad Ĉolić

13 avril - Boire du saké de Toohoku

Il est dans nos habitudes de pique-niquer sous les cerisiers en fleurs mais ce printemps le coeur n'y est pas, en pensant aux souffrances des habitants de Toohoku. Aussi, nombreux sont ceux qui ont cessé de pique-niquer, voyager, faire des courses, pourtant tout ceci n'est pas bon pour notre économie. Une compagnie de saké de Toohoku a envoyé un courriel pour inviter ceux qui n'ont pas été touchés à boire du saké et c'est encourageant. Réconfortés par ce message, nombreux sont ceux qui ont recommencé à boire du saké et autres produits fabriqués à Toohoku et on s'est remis à pique-niquer. Se sentir touché par le deuil est bon un certain temps mais il ne faudrait pas que cela dure trop longtemps, sinon le Japon mourrait et il y aurait de nombreuses faillites. Un mois déjà est passé, donc encourageons les victimes d'une autre façon et revitalisons l'économie japonaise.

22 avril - Les animaux aussi souffrent

Dans la catastrophe, ce ne sont pas seulement les humains mais aussi les bêtes qui souffrent.

Les poissons rouges.

Tous les poissons rouges sont morts dans la maison de mon amie dans la région de Hukushima. L'aquarium n'a pas été détruit par le séisme mais l'eau a débordé. D'après elle, lors de la secousse, ce poisson de 20 ans et 30 cm a heurté la paroi. Sa queue a été blessée. Elle l'a mis dans un autre aquarium mais il est mort. Elle en a eu du chagrin car c'était un ami de longue date. Dans d'autres aquariums, les poissons sont morts, soit suite au choc, soit suite à la panne d'électricité.

29 avril - Lettre de Madame Hukagawa Kazumi (42 ans)

A l'université, j'ai appris des chansons françaises et j'ai participé à différentes actions avec des artistes mais le séisme m'a volé tout intérêt pour ces affaires. Deux semaines après le tremblement de terre, j'ai pensé que je pouvais chanter de vieilles chansons japonaises. J'ai essayé devant mes amis, ils ont été enthousiasmés. Nous avons commencé à nous rendre dans les rues dévastées et à chanter. Les passants, avec masque et sac à dos, s'arrêtaient et s'asseyaient autour de nous. Nous chantions et ils chantaient avec nous. Finalement, c'est devenu un grand chant avec des larmes. Dans des situations difficiles, il ne reste que ce qui existe au plus profond de notre coeur. En ces moments là, nous avons besoin de ces chants. Dans les centres de réfugiés, où tous ont des difficultés, chantons ces chansons tous ensemble.

Depuis, nous avons régulièrement des concerts avec ces chansons dans les écoles et les maisons de retraite. (Mainiçi, le 22 avril)

13^a de aprilo - Trinku sakeon el Toohoku

Estas nia kutimo pikniki sub la belaj sakuro-floroj sed ĉi-tiun printempon, ni ne havas tian emon, rigardante grandan suferon de Toohoku-anoj. Tial multaj ĉesis pikniki, vojaĝi, butikumi ktp., tamen tio ne estas bona por la japana ekonomio. Iu sake-kompanio en Toohoku interrete sendis mesaĝon, ke nesuferantoj trinku sakeon de Toohoku kaj tio estas vera kuraĝigo. Kunsentinte tiun mesaĝon, multaj aĉetas sakeon kaj produktaĵojn el Toohoku kaj oni komencis pikniki. Havi funebnan senton estas bona por iom da tempo sed se tio daŭrus longe, la tuta Japanio mortus kun multaj bankrotoj. Jam unu monato pasis, do ni kuraĝigu la suferantojn alimaniere kaj vigligu la japanan ekonomion.

22^a de aprilo - Suferoj de bestoj

En la katastrofo ne nur homoj sed ankaŭ bestoj suferis/as. Orfiŝoj.

Mortis ĉiuj orfiŝoj en la hejmo de mia amiko en la gubernio Hukuŝima. Akvujo ne rompiĝis, sed la tertremo skuis ĝin kaj akvo elŝprucis. Laŭ ŝia supozo, en tiu skuado, tiu 20-jara 30-centimetra orfiŝo batis sin kontraŭ la vitro. Ĝia vosto multe vundiĝis. Ŝi metis ĝin en alian akvujojn sed baldaŭ ĝi mortis. Ŝi ĉagreniĝis pro ĝia morto ĉar ĝi estis ŝia longa amiko. En kelkaj akvarioj, fiŝoj multe mortis pro la tertremo kaj posta elektra paneo.

29^a de aprilo - Letero de s-ino Hukagaŭa Kazumi (42-jara)

En universitato, mi lernis francajn kantojn kaj tiam mi agadis kun alikampaj artistoj sed la tertremo rabis al mi la tutan intereson pri tiuj aferoj. Du semajnojn post la tertremo, mi ekpensis, ke mi povos kanti japanajn malnovajn kantojn. Mi prove kantis al miaj amikoj. Ili tuj entuziasmiĝis. Ni tre ŝatis tion. Ni komencis viziti detruitajn stratojn kaj kantis. Preterpasantoj kun masko kaj dorsosako haltis kaj sidiĝis ĉirkaŭ nin. Ni kantis kaj ili kantis kune kaj fine tio fariĝis granda kantado kun larmoj. En malfacila situacio ĉe ni restas nur io, kio ekzistas en la profundo de nia koro. Tiam, ni bezonis tiujn kantojn. En la rifuĝejoj, kiam ĉiuj havas malfacilon, kantu tiujn kantojn kune. Nun mi ofte havas koncertojn pri tiuj kantoj en lernejoj kaj maljunulejoj. (ĵurnalo la 22an de aprilo)

HORI Jasuo, traduction Renée Triolle

Kongreso de Esperanto

Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo (IREM)

Inter la 22-a kaj la 26-a de aprilo estis organizita en Sète la interasocia renkontiĝo ĉe Mediteraneo. La renkontiĝo fakte daŭris ĝis la 27-a ĉar estis organizita plusa ekskurso.

Kion diri pri tiu renkontiĝo ? Ĝi estis bonege organizita kun abundaj programeroj. Sed, unue, kiuj estis la partoprenantaj asocioj : Espéranto-France, SAT-Amikaro, FFEA (Franca Fervojista Esperanto-Asocio), FKEA (Franca Katolika Esperanto-Asocio), GEE (Groupe des Enseignants Espérantophones), Eurokka kaj, plej aktive, Langvedoka-Rusiljona Esperanto-Federacio. Aliĝis al la renkontiĝo preskaŭ 400 homoj.

Kion diri pri la kongresejo ? Tre taŭge estas havi la loĝadon kaj la ĉefajn salonojn sur la sama loko. La fericentro Le Lazaret estas jam bone konata de la esperantistoj ĉar ĝi akceptas la partoprenantojn de federaciaj staĝoj jam delonge. Mapon de la centro ni havis en la kongresa libro, tio multe faciligis la serĉadon de lokoj. La restoracioj senprobleme akceptis la gekongresanojn kaj ĉiuj miris pri la rapideco de la servistoj tagmeze kaj vespere.

Kion diri pri la programo ? Ĝi estis abunda kaj riĉplena ! Imagu dum 3 tagoj, estis organizitaj 15 prelegoj (helpo al migruloj, ĉu Esperanto estas facila lingvo, Esperanto en politiko, humuro Lorjak kaj Beaucaire... kaj multaj aliaj) sen forgesi la ekzamen-sesiojn de KER, unu teatraĵon, ses muzikajn spektaklojn...

Kion opinias la kongresanoj pri tiu renkontiĝo ? Hazarde, survoje : Bonege organizita... Belega programo.... Tro da prelegoj samtempe... Tro multe da spektakloj... Bonega ideo kunvenigi

plurajn asociojn samtempe... Asocioj perdas identecon kiam ili kune kongresas...

Raymonde Coquisart



Ekskurso suda kanalo

Mardon la 26-an de aprilo 2011. Ekde vekiĝo... « ĉu pluvas plu ? ». NE, bonŝance ! Eĉ la facila vento sekigis vojojn. Ankaŭ ne frostas. Ekskursiva perspektivo konsolas malgraŭ jam multaj forirontoj. Buse oni babilante miras pri verdaĵoj agrablaj post tiom da kunvenoj ensalonaj dum la kongreso. Kaj, ne kredeble, SUNAS ! Jes, ja...

Do, la ŝipvojaĝo komenciĝis laŭ perfektaj kondiĉoj. Oni povis ekscii ĉion pri kluzoj kaj historio de la « Canal du Midi », monda heredaĵo laŭ Unesko. Samtempe, niaj nazoj ĝuas promesan odoron de la baldaŭa manĝo. Kaj vere ni ricevis ege bongustajn lokajn pladojn : « Capuccino de sèche avec minicake aux lardons », ktp... mirindaĵoj.

Kelkaj rivalbatalis per hajkoj : 3 mal-longaj versoj : 5 + 7 + 5 kun iu aludo

al naturezonoj. Japanino taksis la verketojn. Mi provis : Brulas la suno, Petolas gejunuloj, Daŭros la mondo. Ili ne ŝatis : « ne komprenebla »...

Poste, ni vizitis tre malnovan opidumon, sed tro rapide, ĉar mankis tempo. Pli longe parolis al ni, en sia vinkelo, vitisto pri sia laboro, ekde kvin generacioj. Multaj vinberistoj malaperis, problemoj pri kvantoj, prezoj, leĝoj, konkurenco. Li sendas 80 % de sia produkto en Ĉinion.

Trankvila vespero, feliĉa malstreĉo post kongreso ! La amasoj da paroloj konstruas la amikecon. La vespermanĝo ebligas persvadi junan hungarion, kiu venis en Francio por perfektigi francan lingvon, lerni Esperanton.

Oni ne sukcesis inviti la magian bastonon sed oni admiras la organizadon de tiu belega « interasocia renkontiĝo ». **Michèle Abada-Simon**



Kongreso de Esperanto

Forumo pri la Okcitana lingvo dum IREM

IREM okazis en Seto, ĉe la mediteranea bordo en Sud-Francio, pli precize en regiono Langvedoko-Rusiljono. Kompreneble, dum esperanta aranĝo, stariĝas la demando, kio estas la lingva historio de la gastiganta regiono. Por iom esplori tiun temon okazis forumo pri la okcitana lingvo kun pluraj kontribuoj. Enkonduke rolis la prelego pri Historio de Langvedoko, dum kiu Arno Lagrange konigis kelkajn geografiajn historiajn kaj politikajn faktojn pri Langvedoko, kiu ne estas konstante difinita ento. Ĝin karakterizas, ke ĝi estas trapasejo, regiono en kiu interkruĉiĝas gravaj vojoj: pro tio en la regiono sinsekve venis popoloj el diversaj horizontoj. La regiona kulturo sekve riĉiĝis de tre diversaj influoj. Politike Langvedoko neniam estis centro de potenco sed kontraŭe sinsekve estis posedaĵo de diversaj mastroj: romianoj, vizigotoj, araboj, frankonoj, provenca kaj tuluza grafoj, aragona kaj franca reĝoj, franca respubliko. La nomo « Langvedoko » mem aludas la lingvon tie parolatan en tempo kiam oni ekkonsciis, ke oni ne plu parolas la latinan lingvon, sed latinidajn kiujn oni distingis per la vorto signifanta « jes »: oil (kiu iĝis oui) en Nordfrancio, oc en la sudo, si en Italio.

La okcitana nuntempe estas aro da dialektoj kiuj estis parolataj ĝis la komenco de la 20a jarcento de ĉiuj loĝantoj de la suda duono de Francio (krom Eŭskio kaj la kataluna Rusiljono) kaj krome en kelkaj valoj en Italio kaj en la valo de Arano trans la hispana landlimo. La okcitana inkluzivas gaskonan, langvedokan, provencan, vivaro-alpan, aŭvernian kaj limoĝian ĉefdialektojn, kiuj mem havas pli malgrandajn variaĵojn.

Kulture okcitanlingvio (kiu estas pli vasta ol nura Langvedoko) estis ege brila ĉirkaŭ la 12^a jarcento: la okcitanaj trubadoroj estis varme akceptataj en la kortegoj de okcidenta Eŭropo kaj ilia influo estis granda. En la franca, la okcitandevena vorto « amour » estas unu el la spuroj de tiu influo. Dante hezitis verki

sian Dian Komedion ĉu en la toskana ĉu en la okcitana lingvo, kiu tiam estis pli prestiĝa.

Sed tiu glora tempo estas for. Iom post iom la rolo de la okcitana retroiris, post la perforta krucmilito kontraŭ la albigenoj, post kiam Francisko la 1-a dekretis ke la leĝa lingvo de la reĝlando estos nur la franca, post la konstanta ago de la franca respublika lernejo, kiu dum jardekoj penis malhelpi la uzon de nefrancaj lingvoj (bretona, alzaca, eŭska, flandra kaj ĉiuj regionaj lingvoj nomataj patois = sublingvaĉoj). La rezulto estas, ke nun la okcitana fariĝis lingvo, kiun ties pli kaj pli malmultnombraj parolantoj prihontas,



kion emfazis Farri pere de signifoplenaj anekdotoj. Farri havas apartan sperton: kiel sudkataluno li estis dungita por gvidi feriantajn infangrupojn, kun celo trejni la infanojn paroli okcitane por pligrandigi la ŝancojn, ke genepoj povu komuniki kun geavoj per tiu lingvo. IEO (Institut d'Estudis Occitans), kiu organizas tiujn somerajn kursojn, plencele elektis sudkatalunojn, ĉar ili ne estas francoj kaj la infanoj akceptas la ideon ke ili ne komprenas la francan kaj ke ili nepre interparolu okcitane. Cetere, laŭ Farri, la okcitana estas tre proksima de la kataluna: ĝi aspektas kiel variaĵo de ĝi kun kelkaj arĥaikaj esprimoj. Okaze de tiuj cirkonstancoj Farri vizitadis plurajn okcitanparolantajn regionojn, alparolis la homojn okcitane kaj raportis al ni, kiel homoj reagis al lia okcitana alparolo. Honto, nekonscio ke la okcitana estas

vera lingvo, nescio pri najbaraj parolantoj, neuzo en telefono estas kelkaj el la diversaj faktoj kiujn Farri raportis.

Post la prezento de Farri ekestis debato kun la publiko kaj notindaj kontribuoj de Alain Camelio, setano, ano de IEO kaj JoMo, la tuluza esperantista artisto, kiu atestis pri siaj propraj spertoj rilate al la okcitana. El la publiko venis diversaj atestoj, ĉu pri la okcitana ĉu pri aliaj minoritataj lingvoj: la pikarda, la arpitana, la kataluna. La forumo paŭzis dum tagmanĝo: la precipaj kontribuantoj de la forumo kune manĝis ĉe sama tablo dum kiu ili daŭrigis siajn interŝanĝojn. Post la manĝa paŭzo Alain Camelio rakontis pri la okcitana lingvo en Seto, aparte en la komenco de la 20^a jarcento, prezentante karikaturojn el tiu tempo kiuj montras la setajn tipojn (la arogantan riĉulon, la almozulon, la senkapan metilernanton, la fiŝvendistinon, ktp). Alain Camelio prelegis okcitane kaj JoMo posttradukis al Esperanto por la publiko kaj inverse tradukis okcitanen la demandojn de la publiko. Same rolis Farri en la mateno.

El tiu forumo ne rezultis gravaj decidoj, ĝi estis simple okazo de interŝanĝo de vidpunktoj kaj de informoj pri endanĝerigita lingvo konsiderite en konkretaj vortoj. Homoj en la publiko sekve certe povos pli ĝuste taksii, kia estas la nuna situacio de la okcitana lingvo kaj ankaŭ kiujn kulturajn riĉaĵojn ĝi enhavas.

Defendi la okcitanan lingvon iom similas la reklamadon por Esperanto. Por kontraŭantoj aŭ indiferentuloj, tio aspektas kiel antaŭperdita batalo. Por homoj konsciaj pri la kultura valoro de ĉiu unuopa lingvo, ĝi estas grava bataalkampo en kiu enkalkuliĝas kuraĝigaj signoj kiel instruo de la okcitana al infanoj, dulingvaj ŝildoj, radio, televido, teatro, fabeloj, koncertoj, gazetoj, libroj ktp. en la okcitana. Ni povas esperi, ke dum la komenciĝanta jarcento la okcitana plu vivos kaj ke la angla-usona ne forbalaos ĉiujn lingvojn kiuj konsistigas valoran riĉaĵon de la homaro.

Arno Lagrange

Kongreso de Esperanto

Vizito de Cap d'Agde



Lunde 25-an de aprilo, posttagmeze sub la gvidado de Monique Eysseric ni kune aliris la buson kaj poste, sub blua ĉielo, ni direktiĝis al Cap d'Agde. Cele al ekkonatiĝo kun tiu turisma urbo, Monique faris gravan donacon: ni ĉiuj ricevis turisman gvidilon.

La vojiro serpentumas ĝis la celita urbo kaj ĉiuflanke prezentiĝas speciala tereno nomata « garigo ». Ĝi aspektas kiel mezdezerta areo kun malriĉa aspekto sed tamen montras tipan mediteranean pejzaĝon. Laŭdire, la proksima marbordo senĉese detruigatas kaj la maro gajnas spacon al la tero. Tiel ke, antaŭnelonge,

oni devis konstrui novan ŝoseon paralelan al tiu antaŭe uzata pro konstanta skrapmordo de la maro.

Enurbe ni vizitis la muzeon « Ephèbe » rilatantan al submaraj aferoj postlasitaj de malnovaj ŝipoj sinkintaj pro bataloj aŭ malbona vetero. La muzeo elmontras kolekton da objektoj trovitaj en la marprofundo. Sur la bretoj videblas amferoj diverstipaj, mezepokaj ceramikaĵoj, armiloj (kanonoj ktp), ankroj... Ĉiuj submaraj aferoj estis trovitaj en la regiono, ne aĉetitaj diversloke.

Reirante, ni piediris al monteto por observi la ĉirkaŭaĵon kaj ĝui panoramon ne kutiman. Fakte, ni vidis restaĵon de iama vulkano nigriginta la apudajn rokojn.

Bone organizita vizito en bela pejzaĝo.

Jean Ripoché

Eŭropa referenckadro

KER-ekzamenoj

La 23-24an de aprilo, dum la paskaj festotagoj, okazis la 18^a sesio de la KER-ekzamenoj paralele en du landoj, Francio kaj Germanio. La ekzamenojn sume trapasis 35 personoj.

Dum IREM ekzameniĝis 22 kandidatoj je nivelo C1 kaj 5 je nivelo B2. Ili venis el landoj Francio, Hispanio, Italio, Kubo kaj Svislando. La ekzamensesion gvidis Katalin Kováts, asistis Cyrille Hurstel.

Inter la 6^a kaj 9^a de majo okazis la 19^a sesio de la KER-ekzamenoj, denove en Francio. La unusemajnajn prepar-sesiojn, gviditajn de Stefan MacGill (prezidanto de ILEI) kaj Christophe Chazarein (Tuluzo) en Grezijono glorie fermis la ekzamensesion, al kiu vojaĝis al la kastelo ankaŭ kelkaj, kiuj ne partoprenis la kursojn mem sed venis nur por la ekzameno.

Ekzameniĝis 32 kandidatoj, 9 je nivelo C1, 11 je nivelo B2 kaj 12 je nivelo B1.



Krom la 27 francoj ekzameniĝis du kandidatoj el Rusio, po unu el Hungario, Hispanio kaj Germanio. La francaj kandidatoj je niveloj B2 kaj C1, laŭ la nova decido de UFE, jam povis profiti de la financa subteno de la asocio.

La ekzamensesion gvidis Katalin Kováts, kunekzamenis François Lo Jacomo kaj Stefan MacGill, kiu mem proprahaŭte elprovis la ekzamentaskojn kaj kune kun alia konata esperantisto, Renée Triolle, tre verŝajne baldaŭ akiros sian KER-diplomon.

Laŭ la plej freŝa statistiko ĝis nun 364 kandidatoj el 39 landoj submetiĝis al la ekzamenado. Francio signife firmigis sian gvidan rolon antaŭ Brazilo.

(laŭ Katalin Kováts ĉe edukado.net)

Subvencio por B2 kaj C1 KER-ekzamenoj

Tiu subvencio validas ekde majo 2011 kaj daŭros unu jaron.

Espéranto-France repagas unu trionon (aŭ eĉ du trionojn por junuloj ĝis 30 jaroj) de la kotizo por la ekzameno al la membroj.

La koncernuloj kiuj deziras repagon sendu al la sidejo fotokopion de la kvitanco kiun ili ricevas dum ekzamenado (kun kontonumero RIB aŭ IBAN).

Ne hezitu kontakti la sidejon se vi deziras kromajn informojn.

Ekzamenoj

Komuniko de Franca Esperanto-Instituto

La nombro de kandidatoj por la ekzamenoj de FEI iom kreskis en 2010 : 79 por 12 sesioj.

54 trapasis la unuagradan kaj 52 sukcesis. 21 trapasis la duagradan kaj 5 malsukcesis. 4 trapasis la triagradan kaj 3 sukcesis.

Multaj kandidatoj en la norda federacio de UFE. Ekzamenoj okazis en Boursesse, Nantes, Hilion (SAT-Amikara kongreso), Montpellier, Marseille, Paris, Nilvange, Sète, Grezjono.

Nova verko studenda por la Atesto pri Supera Lernado, « Ĉu vi konas Blaise Cendrars ? » de Manuel de Seabra.

Jen la listo de la membroj de FEI. Prezidanto, Claude (Klaŭdo) Roux ; Vicprezidanto, Vinko Markov ; Sekretario, Jacques (Ĵak) Le Puil ; Vicsekretario, Janine Dumoulin ; Kasisto, Michel Dechy ; Vickasisto, Christian Lavarenne ; Direktoro de la ekzamenoj, Anne Jausions ; ceteraj membroj, Catherine (Katja) Boen, Marie-Hélène (Marielen) Désert, Pierre Dieumegard, Michel Duc Goninaz, Mireille Grosjean, Gilbert Grignaschi, Cyrille Hurstel, Renée Triolle.

Ne hezitu organizi sesiojn, ĉiujn detalojn vi trovos en www.franca-esperanto-instituto.net



Ĵak Le Puil, sekretario

Instruado de Esperanto

Nivelo B1 kaj B2 post kvardeko da lernohoroj

Taskoj laŭ la Eŭropa Referenckadro pri Lingvoj estas uzitaj ĉi-jare por evalui la studentojn de la Esperanto-kurso en la Universitato de Alta-Alzaco post la 40-a horo de la kurso. Ĉe la testo pri parola kompreno (nivelo B1) malsukcesis nur unu studento. Ĉiuj gestudentoj sukcesis du testojn pri lega kompreno : unu je nivelo B1 kaj posta je nivelo B2 (pluraj kun notoj 18/20 kaj 20/20). Temis kompreneble pri gestudentoj, kiuj jam studis du fremdajn lingvojn iel parencajn, sed de komencantoj en aliaj lingvoj oni postulas nur la nivelon A1 por eniri la duan jaron !

Ne eblas trapasigi al ili la oficialajn ekzamenojn pagendajn ene de la universitato, ankaŭ ne por la aliaj lingvoj. Niajn kursvidantojn mi tamen atentigu, ke dank'al tiuj referenckadro la rapideco en la lernado de Esperanto estas nun mezurebla.

E.Luwig




KREADO DE EKOCENTRO

En ĉi-tiu artikolo, ni proponas ekzemplon de agado far iu esperantisto, cele al daŭripova evoluo. (2^a parto)

Eĉe se la bredado de spirulino ne necesas sciencajn kompetentojn, tamen higienon kaj zorgoplenan metodon oni nepre lernu. Tial mi sekvis dum unu semajno tre interesan kaj vivoriĉan staĝon en la sunega regiono Provenco. Krom la plej densa kvanto de spirulinbredejoj tiu regiono posedas ankaŭ la solan agrikulturan liceon (en Hyères) kie oni instruas spirulinbredadon, ekoabelbredadon kaj naturopation.

Nun mi pretas klarigi al vi pli profunde la sekretojn de tiu mirakla cianobakterio, des pli facile se vi venas partopreni la ekorenkonton en Senillé, apud Châtellerault.

Bernard Lagrange



Agenda 21

Membrokunveno 2011 de Espéranto-France

Parta kaj partieca raporteto pri la jarkunveno

La jarkunveno sin sekvas sed ne ĉiam similas.

En 2011, la jarkunveno de Espéranto-France okazis en Sète. Ĝi estis kaj longa kaj teda, sed havis tre pozitivajn aspektojn.

Eble tial, ke neniu tagordo estis sendita al la membroj, la diversaj partoj ne estis ekvilibrataj. Tre longe daŭris la prezentadoj kaj klarigoj de la estraro – koncerne agadon kaj financon raportojn ekzemple –, iom strange ĉar la voĉdono por ili okazis perkoresponde kaj estis jam pasinta kaj restis malmulte da tempo por la tradiciaj « demandoj de la membroj ». Pro tiu longdaŭro multaj membroj eliris antaŭ la fino, aŭ foriris kaj revenis – mi konfesas ke tion ankaŭ mi faris.

Sed vere ĝojiga estis ekscii, ke tiom da projektoj estas naskiĝantaj aŭ evoluantaj en la asocio, kiu nomunis specialan estraron por flegi ties naskiĝon kaj bredadon. Inter tiuj, la petskribo por « Esperanto ĉe Bakalaŭro » estas jam tre kontentige evoluinta kaj modele mastrumita de ambaŭ-asocia komisiono (SAT-amikaro kaj Espéranto-France). Koncerne la financojn de la asocio, la surprizo estis troviĝi antaŭ tiom motiivita kasisto, ke li ne nur entuziasme komentis la prezentitajn tabelojn, sed eĉ faris prelegeton pri la interretaj teknikoj de librotariado ! Eble ne estis la ĝusta momento por Interreta seminario, kiu eble tedis kelkajn... Tamen la seriozezo de nia kasisto – seriozezon li ja pruvis,



akceptante plu esti kasisto la venontan jaron – kondukas min esperi, ke nia asocio finfine, post pluraj malfacilaj jaroj, retrovos financon travideblon kaj stabilecon, ja kondiĉo por ĝia kresko kaj progreso. Ĝis la venonta jarkunveno, kun tagordo kaj multe da tempo por diskutoj !

Jeanne-Marie Cash

Sabaton la 23an kaj lundon la 25an de aprilo 2011 en Sète, feriejo Le Lazaret

Decidaro de la komitatkunsidoj

1. Elekto de la estraro de Espéranto France

la nova Estraro konsistas el Axel Rousseau, prezidanto ; Cyrille Hurstel, vic-prezidanto pri Eksteraj Rilatoj, Informado kaj Komunikado ; Claude Nourmont : vic-prezidanto pri Kulturo kaj Kongresoj ; Sébastien Montagne, kasisto ; Julia Hédoux, vic-kasisto ; Aleks Kadar, ĝenerala sekretario ; Véronique Bichon, vic-sekretario ;

Didier Janot, estrarano.

2. KER-ekzamenoj B2 kaj C1

- Repago de la kostoj por aliĝi al la KER-ekzamenoj B2 kaj C1, je du trionoj por homoj kiuj aĝas malpli ol 30 kaj je unu triono por tiuj kiuj aĝas pli (nur por la membroj de Espéranto-France).

- Repago de la duono de la vojaĝkostoj por la unuaj kiuj trapasos la KER-ekzamenojn en Budapeŝto.

La helpo validos ekde post IREM.

3. Eldonaj projektoj

Ĵ. Le Puil pretigis liston de 1500 vortoj mankaj en Grand Dictionnaire Français-Espéranto (GDFE). Axel Rousseau



La nova estraro

studu la ideon eldoni tiun liston kiel suplemento al GDFE.

4. Venontaj kongresoj en 2013 kaj 2012

Espéranto-France kongresos kun IFEF en Artigues de la 4^a ĝis 10^a de majo 2013. Por 2012 : serĉi lokon !

5. Petskribo por Esperanto en la bakalaŭrean ekzamenon

La projektskipo komunikos al EEU, UEA kaj aliaj retlistoj kaj sendos artikolon al LME.

6. Komuna datumbazo de kluboj

La propono studi la ideon estas aprobita.

7. Nombrado de komunaj membroj de UFE kaj SAT-Amikaro

La propono aldoni enketan linion “Ĉu vi membras al SAT-Amikaro?” en la aliĝilon NE estis aprobita.

8. Klubo 2000

La Komitato APROBAS daŭrigi Klubon 2000. La Projekto KLUBO 2000 estu elektita de la Komitato. Kiel Projekto Klubo 2000 por 2011-2012, la

Komitato elektas la KER-subvencion.

9. Helpo al Halina Gorecka

UFE helpos alvokante je donacoj kaj peros la kolektotan monon.

10. Tombo de Émile Grosjean-Maupin

Li estis i.a. redaktoro de la revuo Franca Esperantisto. Ruiniĝanta tombo en Wavrans-sur-Ternoise (Pas-de-Calais). Decido : UFE monhelpos la projekton renovigi la tombon je po 1 € por ĉiu membro (t.e. ĉ. 600 €).

11. Venonta kunsido

La Komitato venontfoje kunsidos la 2^{an} de oktobro 2011 en Parizo.

(laŭ notoj de la ĝenerala sekretario Aleks Kadar)

Kultura programo de IREM

La kultura programo estis abunda. Dum la interkona vespero vendrede muzikis FaMo ; akompanante sin per akordiono li kantis kanzonojn verkitajn de li mem. Sabate vespere, en la kinejo Comœdia en Seto, grava momento kun la premiera prezento de la dokumentfilmo pri Esperanto fare de la filmisto Dominique Gautier. La filmo montras plurajn intervjuojn de famuloj kaj kelkajn renkontiĝojn, interalie Kaiserslautern kaj Kubo. Post tiu prezento, daŭrigo de la kultura vespero en Centro Brassens por aŭskulti koncerton « Jacques Yvart kantas Georges Brassens ». La koncerto estis organizita kun subteno de la urbeŝtaro de Seto omaĝe al la naŭdekjara jubileo de la naskiĝo de Georges Brassens en Seto en 1921. Nun aperis dua albumo « Brassens plu ».

Dimanĉe vespere, granda folkloro balo kun du esceptaj koncertoj. Unue tiu de Kaj Tiel Plu, fama kataluna ensemblo, kiu prezentis originalan repertuaron kun tradiciaj melodioj okcitanaj kaj katalunaj kun tekstoj en Esperanto. Due, alia folkmuzika ensemblo, la frisa Kapriol' kiu daŭrigis la muzikan kaj dancigan



vesperon. Mirinda momento kiam je la fino la du ensembloj kune ludis por la plej granda plezuro de ĉiuj spektantoj. Kaj lunde vespere, tri programeroj. Unue TTT (Teatra Trupo de Tuluzo) prezentis « Grandioza Kongreso » verkita de Rikardo Cash. La teatraĵeto montras la malfacilaĵojn de esperantisto kiu unuan fojon partoprenas (universalan) kongreson kaj kiu ne povas trovi facile la deziratajn informojn pro manko da informkapablaj esperantistoj aŭ fermitaj ĝiĉetoj. Poste sekvis koncerto de la fama okcitana kantisto Patric. Li prezentis bukedon de okcitanaj kantoj ekde la tempo de trobadoroj ĝis nun kaj aliaj tradukitaj en la okcitana ; kaj kelkajn kantojn de Patric, esperantigitajn de rusino, kantis en Esperanto JoMo. Tiu koncerto ricevis multegajn aplaŭdojn. JoMo daŭrigis kun la slaveca dancensemblo Solniška. Belegaj kostumoj, belega muziko, ritmo kaj sonoj de slavaj landoj, mondkonata humuro kaj talento de JoMo. Ĉi-lastata programero brile kronis la renkontiĝon !

Raymonde COQUISART



en bref ● mallonge

● *La furora verko de Stéphane Hessel **Indignez-vous** estis tradukita grupe al Esperanto kaj nun rete publikigita, kiel retlibro Indignu, de la Eldonfako de SAT.*

<http://www.satesperanto.org/eldonkooperativo/spip.php?article78>



● *Internacia Esperanto-Muzeo Vieno, IEMW ciferecigis plurdekon da presaĵoj el la frua epoko de Esperanto. Temas pri jarkolektoj de periodaĵoj kaj libroj, liberaj el vidpunkto de aŭtoraj rajtoj. En la materialo oni ne povas serĉi laŭ teksto, ili estas simplaj skanaĵoj sen signorekonigado, en bilda formato - sed oni povas legi ilin surekrane. La verkoj estas elŝuteblaj ankaŭ en pdf-formato.*

Adreso de skanitaj periodaĵoj: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>



Adreso de skanitaj libroj: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm> (195 libroj de 72 aŭtoroj)

El Ret-Info, www.eventoj.hu

Internacia Esperanta literatura konkurso «Hristo Gorov - Hrima»

Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson, kiu okazos en ĉiu tria jaro. En la konkurso povos partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj. La konkurso havos la branĉojn poezio, prozo, artikolo. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkitaj en Esperanto. La noveloj devas esti ĝis

4-paĝaj kaj ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu novelo, originale verkita en Esperanto. La poemoj, noveloj kaj artikoloj devas esti komputile kompostitaj. La konkurso ne havas apartan temon. La artikoloj estu dediĉitaj al signifa Esperanta aranĝo. La gajnintoj ricevos signifajn premiojn. La rezultoj estos anoncigitaj en monato oktobro 2012.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 1-a de septembro 2012 al la retroŝta adreso modest@abv.bg aŭ per la tradicia poŝto al la adreso

Georgi Mihalkov, «Nadejhda» V, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Sofio – BG-1229, Bulgario.

(el Ret-Info, www.eventoj.hu)

Ni flegu nian **kulturan heredaĵon** : tombo de Grosjean-Maupin

Antaŭ pli ol unu jaro, la Norda Esperanto-Federacio kontaktis juna historiisto. Iom pli poste loka ĵurnalisto, Marcel Bayart, publikigis en niaregiona ĵurnalo artikolon pri Emile Grosjean-Maupin, entombigita en 1933 en Hericourt eta vilaĝo de la departemento Pas-de-Calais.

La koncesio-periodo baldaŭ finiĝos, do la urbinstancoj intencas forigi la nunan monumenton kaj la restaĵojn de Grosjean-Maupin oni translokos en la komunan ostejon.

Malgraŭ esploroj en Nancy, naskiĝurbo de Grosjean-Maupin, ni trovis neniun posteulon. Do oni detruos la tombon en septembro 2012.

Kompreneble, la esperanta movado devas rigardi antaŭen, sed estonteco konstruiĝas sur la firmaj fundamentoj de l'pasinteco kaj Emile Grosjean-Maupin estis unu el la pilieroj de nia movado.

Naskiĝinte en 1863 Emile Grosjean-Maupin esperantistiĝis en 1903 kaj tuj tre aktivis por la lingvo. Li verkis multajn recenzojn kaj artikolojn en la tiamaj revuoj, Heroldo, Sennaciulo, Literatura Mondo... Li estis konstanta redaktoro de Franca Esperantisto de 1908 ĝis 1921. Li iĝis Lingva Komitatano en 1908 kaj membro de la Akademio de Esperanto en 1920.

Li aŭtoris la ĉefajn vortarojn Esperanto-Français (1910), Français-Esperanto (1913) kaj en 1930 la Plena Vortaro, pri kiu li laboris pli ol 20 jarojn.

Sur lia difektita tombo-ŝtono, ankoraŭ legeblas (sed malfacile) :

« **Ici repose**

Emile Grosjean-Maupin

Chevalier de la Légion d'Honneur

Ancien élève de l'École Normale Supérieure

Professeur agrégé de l'Université

Directeur honoraire de l'Institution des jeunes aveugles

Directeur de l'Académie Espérantiste

1863-1933 »



La tombo-ŝtono de Grosjean-Maupin

(Ĉi-tie ripozas Emile Grosjean-Maupin Kavaliro de la Honora Legio, Ekslernanto de la Profesora Altlernejo, Agregacia Profesoro de l'Universitato, Honora Direktoro de la Instituto por junaj blinduloj, Direktoro de la Esperanta Akademio, 1863-1933).

La Norda Esperanto-Federacio do decidis savi kaj restarigi la tombon de Grosjean-Maupin kaj honorigi lian memoron dum sia venonta tuttaga federacia kongreso en la printempo 2012. Tiu manifestacio estos ne nur omaĝo al la pasinteco sed ni dezirus, ke ĝi estu okazo impliki la lernantojn kaj ties instruistojn dum ekspozicio kaj prezentado de Esperanto. La kontaktojn kun la urbestro ni jam havis.

Dum la Interasocia Renkontiĝo de Espe-

ranto en Sète, ni prezentis tiun projekton pri restarigo de la tombo de Grosjean-Maupin. Unuanime la ĉeestantaro decidis komunan agadon pri tiu projekto, kiu havas tutmovadan celon.

Ni sendis subvencipeton al Espéranto-France, al SAT-Amikaro kaj al S-ino Lafargue, vicprezidanto de IFEF. Kelkaj ĉeestantoj proponis lanĉi ankaŭ subskripcion por la individuaj membroj, kiuj volos mondonaci.

Marmoristo sendis antaŭfakturon de 4 000 € por la tombo. Restas do apenaŭ unu jaro por ricevi la monhelpon de la asocioj, de la lokaj kluboj kaj de la individuaj membroj.

Subvenciojn kaj mondonacojn oni povas pagi per ĉeko aŭ ĝiro al « Fédération Espéranto - Nord - Lille 0051715G026 ».

Por la eksterlandanoj per sia banko ĉe la konto IBAN FR58 2004 1010 0500 5171 5G02 625 BIC PSSTFRPLIL

Menciinte dorse de via ĉeko « por la savo de la tombo de Grosjean-Maupin » bonvolu sendi ĝin al la kasisto de la regiona Federacio Xavier VILAIN, 3 rue du Mont de Piété 59380 BERGUES (Francio).

La prezidanto de la Norda Esperanto-Federacio, Arlette PLUTNIAK



La unua animacia filmo en Esperanto

Post jarlonga studado kaj laborego, Simono Keith sukcesis diplomigi pri klasika animacio ĉe la vankuvera filma studejo (Vancouver Film School) en Brita Kolumbio, Kanado. Post intensa eduko pri la principoj kaj fundamentoj de animacio, li dediĉis pli ol kvar monatojn al kreado de filmo tradicie desegnita sur papero. La rezulto estas Ĉapeloj, la unua animacia filmo en Esperanto. Li tuj poste kreis plian filmon, Neĝuloj, en nur kelkaj semajnoj uzante komputilajn ilojn. Ambaŭ filmoj debutis ĉe lia diplomiga ceremonio, la 17-an de decembro 2010. La 10-an de februaro, Ĉapeloj gajnis

premion en loka filmkonkurso en Fort Collins.
Por spekti ambaŭ filmojn rete, bonvolu

viziti la blogon de Simono [http://cxape-
loj.blogspot.com](http://cxape-
loj.blogspot.com)

Informis : Simono Keith



Au château de Grésillon cet été...

16-23 juillet : Séminaire avec conférences et discussions (interlinguistique, sciences, les verts, énergies renouvelables...). Cours intensif d'espéranto.

23-30 juillet : Semaine alternative (écologie en pratique, thérapies médicales, végétarisme, tourisme verte, naturisme, tolérance...). Cours d'espéranto le matin. Repas végétarien.

30 juillet - 6 août : Cours d'espéranto et de français le matin. Excursions-visites de châteaux de la Loire l'après-midi. Soirées culturelles avec la contribution de Ranga, professeur à l'université en Andrah Pradesh, Inde.

15-24 août : Semaine festive pour enfants et familles (toute de suite après FESTO organisé par Espéranto-Jeunes). Activités artistiques et musicales, sport, jeux et cours d'espéranto.



www.gresillon.org
tel.: +33 (0)9 51 64 10 34

Dum la venontaj monatoj en Kvinpetalo

Studi sub gvido de altnivelaj profesiuloj

Aŭgusto 9a-13a : Tradukado altnivela - Brian Moon (vicprezidanto de la Akademio; profesie tradukisto ĉe la Eŭropa Komisiono). Ni okupiĝos ne pri teorio sed pri praktiko : traduki tekstojn de diversaj specoj kaj analizi la aperantajn problemojn kaj eblojn.

Aŭgusto 16a-20a : Biblioteka ordigado - Philippe Cousson (bibliotekisto). Biblioteko : propra, kluba, institucia. Malkovro, klasifiko, prizorgo, uzo, katalogo.

Aŭgusto 16a-24a : Muzika Staĝo - Markov-familianoj (gvidos la kurson Lino Markov, profesia instruisto pri muziko). Esperanto estos praktikata pere de muziko. La kerna laborpeco estos plurvoĉa kanto laŭ originala poemo en esperanto muzikigita de profesia komponisto speciale por tiu ĉi okazaĵo.

Oktobro 8a-9a : Vigligi la agadon en Piktavio (kaj aliaj regionoj) - Marie-France Conde Rey

Oktobro 10a-14a : Malkovri la Esperantan literaturon - Anne Jausions (diplomita pri Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz, en Poznan)

Oktobro 25a-29a : Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrioj - Michel Dechy. Uzante regule ekde kvin jaroj la albumon Tinĉjo en Tibeto en siaj Esperanto-kursoj (2a nivelo), Michel kunigis tiun laboron en libra formo : La bildstrioj kiel lernolibroj, aperinta en 2010. Neperforta komunikado - Bernard Lagrange

Informoj ĉe KVINPETALO Esperanto-Centro
15 rue du Lavoisier F-86410 BOURRESSE
<http://www.kvinpetalo.org/spip.php?article37> (esperante)
<http://www.kvinpetalo.org/spip.php?article38> (france)
informoj @ kvinpetalo.org
Telefono : 33 (0) 549 034 314



La vojaĝo de Rose kaj Cyrille en Meksikio

Ni vespere eliras el la unuiĝintaj ŝtatoj de Ameriko por eniri en la unuiĝintajn ŝtatojn de Meksiko tra la urbo Tijuana, unu el la plej trapasataj landlimoj en la mondo. Tijuana ankaŭ fifamas pro la ŝakrado de armiloj kaj narkotaĵoj, kaj la kaŝa transpaso de senpasportuloj.

Tijuana proksimas de la oceano. Survoje tien, ni laŭbiciklas la altajn palisarojn, kiuj apartigas ambaŭ landojn, eĉ en la blua akvo de Pacifika Oceano. Je la meksika flanko troviĝas turisma plaĝo viva kaj vigla kaj je la usona flanko etendiĝas plaĝo blanka kaj dezerta je pluraj kilometroj.

Ni longe hezitis pri la elektinda vojo, ĉar ĉiuj promesas, ke tiu vojo aŭ tiu alia pli ebenas aŭ pli sekuras. Ni decidis pasi tra Ensenada, en la kalifornia duoninsulo, kiu iras ĝis La Paz kaj trapasas la dezerton de Sonora. Temas pri vera dezerto, sen akvo. Cirilo portas, krom la kutimaj sakoj je 30 kg, 7 litrojn da akvo. Ni fotadas kaktajn arbarojn kaj la varmo estas neeltenebla. Tamen, dumnokte, estas plezurige dormi meze de la dezerto sub la luno!

En Santa Rosalia ni enŝipiĝas al Guaymas por forlasi la duoninsulon. Jam la morgaŭon ni pluiras per buso al Gvadalaharo. Ni ne havas elekton, niaj gepatroj venos al Meksikurbo por renkonti nin post du semajnoj kaj tempo mankas al ni. En du tagoj ni pasigas 18 horojn en transportiloj. Feliĉe, en Gvadalaharo, la juna esperantistino Sara gastigas nin kaj ni povas bone ripozi. Ŝi igas nin gustumi la lokajn nutraĵojn, interalie pitajon, specon de kaktofrukto.

Por danki ŝin, ni prezentas al la loka Esperanto-klubo fotojn pri nia vojaĝo. Poste, la naŭ junaj esperantistoj malkovrigas al ni la monumentojn famajn kaj malpli

famajn de sia urbo. Ulises, kiu ankaŭ scipovas la Lingvon Internacian, siavice gastigas nin tri tagojn en alia kvartalo de Gvadalaharo, la urbo de kie originas la du ĉefaj turismaj allogaĵoj, mariaĉoj kaj tekilo.

En Meksikurbo, ni ankaŭ komunikas en Esperanto kun Alejandro, kiu akceptas nin siahejme. Ankaŭ li donas al ni valorajn informojn pri la kulturo kaj la vivo en sia lando: « Ni staras sub la luna umbiliko », laŭvorta traduko de la vorto Meksiko.

Kelkajn tagojn poste, alvenas en Meksikurbo niaj gepatroj. Ili kunportas en siaj sakoj novan tendon por ni, ĉar nia difektiĝis. Ili ankaŭ alportas biciklerojn... kaj tubon de franca mustardo.

Post ilia foriro, ni direktiĝas al Atlantiko. Unuavice al Puebla kaj Verakruz, antaŭ ol kromiri al Palenque por viziti piramidojn. Ni fine pasas tra San Cristobal de las Casas, de kie ni alvenas je la landa ekstremaĵo.

Ni restis en Meksiko preskaŭ tri monatojn kaj ni biciklis pli ol 3000 km, kio ekvivalentas je tri fojoj Parizo-Perpinjano. Ni plurfoje pasis de la marnivelo ĝis pli ol 2000 metroj alte, kun pinto je



3100 m. Kaj ni trabiciklis la landon de Pacifiko ĝis Atlantiko.

Cirilo kaj Roz'
<http://horizonto.free.fr>
Eblas legi la tuton de iliaj aventuroj sur la retpaĝaro.

